Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 02/04/2020 Kvarcentsepdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*
Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*
Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute 715,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **277,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **234,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **204,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde junio 2020 ?)
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)

★★★

Konvid19 Du Esperantaj viktimoj

Bedaŭrinde ĉi-semajne 2 maljunaj Esperantistoj mortis pro la koronviruso en Italio. Ili estas Julia Sigmond kaj ŝia edzo Filippo Franceschi**.** Ili ambaŭ estis verkemaj kaj ricevis premiojn en la Belartaj konkursoj de UEA. La kromnomo de Filippo estas Sen Rodin. Tiu nomo estas bone konata de mi, ĉar li estis tre ofta kontribuanto al la aŭstralia retrevuo Mirmekobo de Donald Broadribb. Jen vi povas legi unu el la amuzaj noveletoj de Sen Rodin https://www.monato.be/2006/008905.php Amike, *Nicole Else*

★★★

Firmao dum seminario konfirmis, ke 25% (!!) de la vendoprezo de unu kWh estas diversaj interezopagoj. Kaj kien iras tiuj pagoj? Al la bankoj. Nun rigardu, kiu posedas la bankojn kaj kiu vere profitas de nia intereza sistemo.

Mallonge dirite, ni bezonas alian monsistemon. Sistemon, en kiu neniu plu povas ekspluati aliajn homojn.

Tiam eble ni sukcesos eduki la homojn kompreni, ke universala baza enspezo estas elspezo de la socio, al kiu ĉiuj devas kontribui.

Ĉu revolucio helpos? Mi forte dubas. Mi nur konas revoluciojn, kiuj kostis multajn vivojn kaj suferojn kaj kies rezulto estis, ke nova grupo da homoj kun fortaj kubutoj subppremis la aliajn.

Silvio Gesell proponis negativan monon. Legu pri li ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Silvio_Gesell, legu pri la "miraklo", kiu okazis en la vilaĝo Wörg en Aŭstrujo ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/W%C3%B6rgl .

Amike, *Peter Weide*

★★★

Dr. Fauci prezentas novan maskon, kiu savos milojn da vivoj.

Peter Weide

IJEA – INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

"Karaj geprezidantoj de tutlandaj, enlandaj kaj internaciaj E-Asocioj:

De antaŭ pli ol unu jaro ekis varbadkampanjo cele al aniĝo de novaj membroj al la Jura Asocio de Esperantio, nuntempe nomiĝanta **Internacia Jurista Esperanto Asocio** (IJEA). Tiu kampanjo estis komence adresita al pluraj asocioj, universitatoj kaj personuloj el multaj landoj. La rezultoj ne estis kontentigaj.

Ĉi retmesaĝo estas nun sendata cirkulere al ĉiuj prezidantoj kaj kunestraranoj de tutlandaj, enlandaj kaj internaciaj Asocioj**,** kies retadresoj eblis ekhavi.

La intenco estas ke Vi, bv., sciinte pri la ekzisto de iu juristo (advokato, juĝisto, prokuroro, notario, jurstatuskonservejestro, jurprofesoro aŭ alispeca juristo) aŭ eĉ studento pri Juro au juristo staĝanta, plusendu al li/ŝi la ĉi-kunan inviton al aniĝo al **IJEA.**

Membro-studento kaj membro-staĝanto pagas nenion kiel aniĝkotizon nek kiel ankotizon.

IJEA, laŭ plano de ĝia estraro, volas pliiĝi laŭ nombro da membroj (plejtrafe el ĉiuj mondpartoj), interalie cele al kreskado de ties reprezentanteco kaj videbligo al juraj medioj tra la mondo kaj interrilatado kun ne esperantaj juraj internaciaj asocioj kaj estaĵoj.

Krome ni ŝatus havi almenaŭ unu membron po Lando. Orientazianoj ekzemple tute mankas en IJEA. Nun brazilanoj, hispanaparolantoj kaj ĉinoj konsistigas pli ol duono de la juristoj en la planedo. Do ĉi-kampanje ili tre gravas strategie cele al tiuj kreskado kaj videbligo. Aligu iun bv. La pligraviĝo de IJEA povas multe kontribui al la pligraviĝo de UEA, Esperantio kaj do almenaŭ nerekte al la la pligraviĝo de viaj tutlandaj, enlandaj kaj internaciaj E-Asocioj.

Elkore via, la IJEA-prezidanto: *Miguel Faria de Bastos* (Portugalio Angolo)
Sendis al AE *Heather Heldzingen*

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

AEA Estrarkunveno

Venonta kunveno 2an de aprilo 2020. *Sandor Horvath*



La pandemio povus:

mortigi milionojn da homoj, sed almenaŭ 85% post vivos

La kolapso de la ekonomiaj sistemoj povus:

Detrui la vivkapablon de multbilionoj da homoj. (la nunaj ekonomiaj sklavoj)

Tiam oni batalos por la vivo kaj bilionoj mortos.

Universala Pensio por ĉiuj plenkreskuloj povus:

Pacigi kaj savi la mondon.

Forigi la ideon ke kreskado estas bona por la planedo.

Liberigi la ekonomiajn sklavojn kiuj subtenas la profitojn de riĉuloj.

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Arbtranĉado nun en mia ĝardeno.

ĈU MINIMUMA MONDA SALAJRO ?

Roger proponas ke ni devas labori por enkonduko de Universala Baza Enspezo, kaj ke tio helpos solvi la nunajn ekonomiajn problemojn. Jen miaj rimarkoj pri tio:

1). La enkonduko de U.B.E. precipe kaj grandege helpos la bonstaton de miliardoj da homoj. Sed ĉu ĝi solvos la ekonomiajn problemojn, laŭ mi estas tute ne certa.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

2) La ekonomia situacio laŭ mi nur pliboniĝas, se la grandaj universalaj korporacioj ne plu havas la ekonomian potencon kaj ne plu posedas la ekonomion. Do doni tiun ekonomian potencon al la tuta popolo estos la unua bezono.

3). Sed ni revenu al la U.B.E.: Tiu celo en si mem, sen ŝanĝi la ekonomion, estas grande valora celo se ĝi sukcesos, kaj kun la permeso de la korporacioj. Tre valoras labori por tio. Mi supozas, ke ekzistas monda organizo kiu laboras por U.B.E. Sed por sukcesi en tia funda novaĵo en la mondo oni bezonas amasojn da homoj en ĉiuj landoj kiuj pretas labori por tio. Ĉu tiuj amasoj jam ekzistas?

4). Ni vidas en la historio de la homaro, ke grandaj ŝanĝoj okazas nur se grandaj amasoj batalas por tio. Nur tre malofte "revolucieto" de universitataj studistoj sukcesis ŝanĝi reĝimojn, ekz. en Japanujo antaŭ dudeko da jaroj. Sed ĝenerale oni bezonas grandajn amasojn, kiel en la franca kaj rusa revolucioj.

5). la enkonduko de U.B.E. donus pli da profitoj al la korporacioj, ĉar la homoj havus pli da mono kaj elspezus pli. Sed ĉu tio estas ekonomie senca, se la homoj foruzos pli kaj pli da nia tero? Kaj cetere, ĉu la korporacioj akceptus la U.B.E.? Kaj ili ja estas fortegaj, kaj povus neniigi ion ajn. Tiukaze ni devus batali kontraŭ la korporacioj, kaj ĉu mi kaj ci kaj vi pretas fari tion? Ĉar mi kaj ci kaj vi certe perdus multe da nia aĉetkapablo, ĉar estus precipe ni kiuj devos pagi por tiu U.B.E. Mi dubas ĉu la legantoj de A. E. pretus oferi sin.

6). Same grava kiel la mortado pro manĝmanko estas la fakto ke ni foruzas tro de nia tero. Ni devus ĉesi manĝi viandon (mi manĝas viandon), ĉar fari manĝaĵon el bestoj kostas multege pli de la tero ol la farado de manĝaĵo el la uzo de la tero por kreskigadi legomojn kaj fruktojn kaj nuksojn. Ĉu la riĉaj kaj riĉetaj ĉinoj akceptus tion, dum ili nuntempe grande pliigas sian manĝon de viando? Se ni nun ne pli saĝe agas por nia propra survivo, ĉu ni agos por la survivo de la grandaj amasoj da homoj mortantaj pro manko de manĝaĵo?

Marcel Leereveld.

MI FORBRULAS ARBOJN DE MIA ĜARDENO.

Ĉar nun estas la tempo en la jaro ke mi kaj ni rajtas en la ĝardeno forbruli plantojn kaj plantpartojn, mi jam dufoje havis grandan seshoran forbruladon de forĵetindaj mebloj lignaj kaj de tutaj arboj kaj arbetoj, kaj de tre multaj malgrandaj kaj kvinmetraj branĉoj, kaj de misherboj. Oni devas esti tre zorgema por malebligi ke la fajro ne iru al aliaj partoj de la ĝardeno. Dum la lastaj kvindek jaroj mi plantis multajn, tro multajn, arbojn, kelkaj el kiuj nun estas dudekkvin metrojn altaj. Kelkaj malgrandaj arboj formortis, pro aĝo aŭ pro malsano. La insektoj de unu malsano mortigis ĉiujn "*chameocyparis*" arbojn. Ĉe kelkaj eŭropaj arboj nur la supra duono de la arbo mortis, kaj mi ne scias kial. Kelkaj el ili fine mortis, aliaj ne.

Marcel Leereveld.

★★★